

Intervjuo kun Giorgio Silfer pri la kulturpolitiko de Literatura Foiro

Radioprelego de Claude GACOND, SRI-798/242, 1979 januaro 25 kaj 27

<http://www.esperanto-gacond.ch/SRI/Radiokasedo-1979-34->

[/Radioprelego_798_SRI_242_1979_01_25_27_Intervjuo_kun_Giorgio_Silfer_pri_la_kulturpolitiko_de_Literatura_Foiro.mp](http://www.esperanto-gacond.ch/SRI/Radiokasedo-1979-34-/Radioprelego_798_SRI_242_1979_01_25_27_Intervjuo_kun_Giorgio_Silfer_pri_la_kulturpolitiko_de_Literatura_Foiro.mp3)

3

Cl.- Parolas Claude Gacond kun s-ro Giorgio Silfer, ĉefredaktoro de Literatura Foiro. Dum la pasintaj monatoj Literatura Foiro iom post iom instaliĝis en la urbo La Chaux-de-Fonds. Kaj nun mi profitas fari demandojn al ties ĉefredaktoro, s-ro Giorgio Silfer, ĝuste pri tiu ĉi instaliĝo. Do, s-ro Giorgio Silfer, kial LF, Literatura Foiro, instalas sian ĉefredaktejon en Svislando, tio estas: en la urbo La Chaux-de-Fonds.

GS.- Oni ne povas paroli pri tiom granda strategia plano. Estas fakto ke en La Chaux-de-Fonds jam ekzistis unu el la tri redaktoj de Literatura Foiro, precize la okcidenta. Kaj tiam en la duono de 1978a ni fermis, mi povas diri, la periodon de nia norda redakto. Dum tri jaroj fakte en Finnlando ni havis la ĉefan sidejon, kaj ni instaliĝis en lokon, kie jam estis sufiĉe establita filio de nia entrepreno. Mi volas diri, ke fakte oni ne tiom elektis landon, kiom oni elektis verŝajne situacion. Estas konata la fakto ke dum la lastaj dek jaroj en La Chaux-de-Fonds koncentriĝis pluraj entreprenoj, kiuj je scienca nivelo kiel CDELI, je faka nivelo kiel Kultura Centro Esperantista, je pedagogia nivelo kiel Internacia FERIA Altlernejo kaj je informa nivelo kiel Komisiono Esperanto Lernejo, ege kontribuis al la disvastigo de esperanto kaj ankaŭ al la fakigo de la uzo de esperanto. Efektive troviĝas en La Chaux-de-Fonds tute alia situacio, kiu faras el tiu urbeto spite al ĝia ne-asimilebla nomo, specon de centro preskaŭ de ĉefurbo de esperantujo, aŭ almenaŭ de centro al kiu oni povas pivoti la intelektajn fortojn de la esperanta mondo. Tio cetere bone kongruas kun la tradicio de esperanto en Svislando. Svislando estis unu el la centroj de la agado por la internacia lingvo. Tie ĉi naskiĝis UEA, tie ĉi UEA havis sian unuan sidejon, en Svislando oni invitis plej multe da Universalaj Kongresoj post Britio, fakte. En Svislando oni havas apartan tradicion de popolo tre ĵaluza pri la individuaj rajtoj kaj liberecoj. Kaj speciale en Romandio aparte evoluis la principoj, almenaŭ en kultura kampo, de mondfederalismo, de kunlaboro inter la popoloj, de interpopola konduto. Ĉio ĉi formas ian etoson, ian atmosferon, kiu laŭ mi en la redakcio de Literatura Foiro estas la plej natura por gastigi nian ĉefan sidejon. Kaj tiam, profitante mian transloĝiĝon al Svislando, oni ankaŭ kaptis la okazon doni ian kvazaŭ kulturpolitikan tuŝon al la linio de Literatura Foiro.

Cl.- Ni scias, ke Literatura Foiro faris analizon de la situacio de la esperanto-institucioj. Do, eble, kiel LF analizas la nunan situacion de esperanto-institucioj?

GS.- Verŝajne vi aludas al la kulturpolitika raporto pri la jaro 78a, kiun aprobis unuanime nia administra konsilantaro, ĉu ne?

Cl.- Jes.

GS.- Do, tie fakte ni vidas la Esperanto-instituciojn en la sama perspektivo, en kiu oni rigardas la ĝeneralajn asociojn aŭ instituciojn pli bone, kiuj pledas por aŭ laboras per, aŭ diskutas pri lingvo. Ekzemple estas kelkaj prilingvaj institucioj, kiel *Académie française* pri la franca lingvo, aŭ *Accademia della Crusca* pri la itala lingvo. Kaj analoge al tio ekzistas en esperantujo la *Akademio de Esperanto*. Ekzistas ankaŭ institucioj kiuj laboras por la lingvo, do por disvastigi la lingvon kaj tio estas la kazo de *British Council* por la angla, aŭ de *Alliance française* por la franca, ĝis la plej malriĉaj ĉiuj, *Società Dante Alighieri* por la itala,

tie troviĝas do la tradicia esperanto-movado kun la branĉoj de UEA. Ekzistas ankaŭ iu perlingva aktivado, nome tiuj porlingvaj kaj prilingvaj institucioj kreas necesojn, kiujn povas plenumi nur apartaj institucioj mem. Estas ekzemple komparo farebla kun la sekcioj de la *Ligue internationale de l'enseignement de l'éducation et de la culture populaire* en la franclingva Afriko. Kaj tiurilate ni povas situigi en la saman kuntekston ekzemple *Sennaciecan Asocion Tutmondan*. Dum la lastaj jaroj ni rimarkis ke ekzistas nova fenomeno. Tio estas, ke pli kaj pli institucioj kiuj fontas el la socia bezono mem, sieĝas, por tiel diri, tiujn ĉi tradiciajn instituciojn de la tradicia esperanto-movado. Ekzemple universitataj fakoj kaj profesiaj lingvistoj sieĝas la Akademion. Okupiĝas pri la samaj problemoj el verŝajne pli faka vidpunkto. Ekzemple internaciaj kulturservoj, diversaj centroj sieĝas la tradician esperanto-movadon, la landajn sekciojn de UEA rilate al la porlingva agado. Ekzemple diversaj ŝtataj entreprenoj, kiel la radioj mem sieĝas la perlingvajn instituciojn kaj demonstras per la rekta uzo de esperanto, ke ĝi estas taŭga, ke ĝi estas kompleta, ke ĝi estas preta esprimi ĉion kaj eventuale eĉ ankaŭ ion. Tiu ĉi estas praktike la analizo kion ni faris. Ni konstatis, ke verŝajne la tradicia esperanto-movado elĉerpis sian historian funkcion. Nome, gardi tra jardekoj da planlingvaj ŝtormoj tra kongresoj, père de diversaj institucioj, de diversaj kunvenoj, de klubo vivo, gardi la unuecon kaj la stabilecon de la lingvo. Nome, la tradicia esperanto-movado dum la unua jarcento ne sukcesis venkigi esperanton ĉe la ne-esperantistoj. Sed ĝi certe sukcesis venkigi specon de esperanto, do la fundamentan esperanton, ni vidu, inter la esperantistoj. Tiu ĉi grava historia rolo ŝajnas al mi plenumita. Kaj jen kial el la socia bezono fontas institucioj, kiujn ni ne povas rigardi en rekta linio kun la tradicio de la movado.

Cl.- Kaj nun, post tiu pripensinda analizo, kiel vi vidas la rolon de Literatura Foiro?

GS.- Ĝi estas laŭ ni aŭtonoma rolo, nome ĝi estas nek en la movada citadelo, nek inter la sieĝantoj. Mi povas diri ke ni troviĝas kvazaŭ sur la kresto de la monto kaj ni rigardas al la verda valeto, kies belaĵojn ni vidas kaj ni volas priskribi kaj samtempe ni rigardas al la vasta perspektivo de la ebenaĵo, de kie venas ankaŭ tiuj institucioj kreitaj de la socia bezono.

Cl.- Vi aŭdis elsendon el Svislando. Claude Gacond parolis kun s-ro Giorgio Silfer, ĉefredaktoro de Literatura Foiro. Ĝis reaŭdo!